



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 51

Melburno (Melbourne), Australio.

10 septembro 1924

LA TIBIKARNOJ DE LA KAPITANO.

La morgaŭan tagon la regimento estis inspektota de generalo Bourcier. Unu el niaj kapitanoj, bela junulo, estus unu el la plej belformaj en la armeo, se liaj tibikarnoj estus konvenaj al la cetero de lia korpo; sed li havis krurojn similajn al irbastonoj, kiuj faris tre malplaĉan efekton kun la tiel nomita Hungara pantalone, tiutempe portata de la chasseurs. Kiel rimedo kontraŭ tiu nekonveneco kapitano B—farigis du iom grandajn pufojn en formo de tibikarno, kiuj, alĝustigite al liaj kruroj, kompletigis lian belan staturon. Oni vidos, kiel tiuj falsaj tibikarnoj estis kaŭzo de mia arestiĝo sed ne la sola kaŭzo. La regularo preskribis, ke la ĉevaloj de la oficiroj havu longajn vostojn kiel tiuj de la kavalerio. Nia kolonelo, sinjoro Moreau, ĉiam rajdis admirindan ĉevalon, sed la vosto de ĉiuj liaj ĉevaloj estis fortranĉitaj; tial, sciante, ke generalo Bourcier estas tre severa pri la observo de la regularo, kaj timante, ke tiu riproĉos al li la malbonan ekzemplon metitan antaŭ la oficirojn, li, pro la inspekto, farigis falsajn vostojn por ĉiuj siaj ĉevaloj. Tiuj imitaĵoj estis tiel mirinde alĝustigitaj, ke se oni ne sciis pri la artifiko, oni ne dubus, ke ili estas naturaj.

Ni iris la inspekton, al kiu generalo

Bourcier invitis generalon Suchet, inspektoro de la infanterio kaj generalo Gudin, komandanto de la teritoria divizio. La inspektado daŭris longan tempon, preskaŭ ĉiuj manovroj estis faritaj galope kaj finiĝis per kelkaj rajdatakoj je plena rapideco. Sub mia komando estis unu centra sekcio, formanta parton de la eskadrono sub kapitano B—, apud kiu la kolonelo sin lokis. Tial ili estis du paŝojn antaŭ mi, kiam la generaloj venis antaŭen por gratuli kolonelon Moreau pri la admirinda maniero de la manovrado. Sed kion mi vidis? La ekstrema rapideco de la ĵus faritaj manovroj malaranĝis la simetron de la aldonaĵoj al la ekipo de la kapitano kaj la kolonelo. La falsa vosto de la ĉevalo de tiu ĉi parte deligiĝis; la stumpo, farita el bulo de stupo, sin trenis preskaŭ sur la tero, similante malvolviĝantan fadenbulon, dum la falsaj haroj estis kelkajn futojn pli alte en la aero kaj disetenditaj en formo de ventumilo super la postaĵo de la ĉevalo, kiu ŝajnis posedi grandegan pavan voston. La falsaj tibikarnoj de kapitano B— pro la premado de la selklapoj ŝoviĝis antaŭen sen lia scio, kaj jam nun prezentis la tre komikan efekton de ronda bulo sur ĉiu tibio, dum la kapitano ĉiam sidis fiere rekte sur sia ĉevalo, kvazaŭ li dirus: rigardu min! Kia belulo mi estas!—kiam oni estas nur dudekjara oni ne posedas multe da seriozeco; subĝis

mian la groteska spektaklo antaŭ miaj okuloj, kaj, malgraŭ la impona ĉeesto de tri generaloj, mi ne povis deteni min de laŭtega ridado. Mi tordiĝadis sur la selo, mi mordadis la manikon de mia tuniko: tio ne utilis, mi ĉiam ankoraŭ pli kaj pli forte ridis, ridadis, ĝis miaj flankoj doloris. Ĉe tio, la general-inspektoro, ne sciante la kaŭzon de mia gajeco, ordonis, ke mi foriru el la vicaro kaj metu min sub areston. Mi obeis, sed ĉar mi devis pasi inter la ĉevaloj de la kolonelo kaj la kapitano, miaj okuloj, malgraŭ forta peno, denove falis sur tiun inferan voston kaj sur la lastmodajn tibikarnojn, kaj denove mi eksplodis je neĉesigebla ridado, kiun malpliigi nenio povis. Estas konjekteble, ke la generaloj pensis, ke mi frenezigiĝis; sed, tuj kiam tiuj foriris, la oficiroj de la regimento, veninte al la kolonelo kaj kapitano B—, baldaŭ sciigis pri tio, kio okazis, kaj ridis kun mi sed kun malpli da danĝero al si mem.

Tiun tagon majoro Blancheville ĉeestis vesperfeston ĉe sinjorino Gudin. Kiam generalo Bourcier, kiu ankaŭ estis tie, parolis pri tio, kion li nomis mia kaprico, majoro Blancheville klarigis la kaŭzon de mia neĉesigebla ridado. La generaloj, la sinjorinoj, la tuta stabo ridadis ĝislarme pri la rakonto, kaj ilia gajeco duobliĝis, kiam envenis la bela kapitano B—, kiu, jam antaŭe relokinte la falsajn tibikarnojn en la ĝustan pozicion, venis por paradi en tiu brila societo, neniel suspektante, ke li mem estas unu el la kaŭzoj de la gajeco. Generalo Bourcier komprenis, ke, se li mem ne povis deteni sin de plengorĝa ridado, nur aŭdante priskribon, estis nature, ke juna subleŭtenanto ne povis regi sin, vidante tiel ridindan spektaklon. Li ordonis tuj liberigi min de aresto kaj venigi al la festo. Tuj kiam mi eniris la ĉambron la general-inspektoro kaj la tuta kunvenintaro eksplodis je laŭtega ridado, al kiu mi mem, pro mia memoro pri la matena sceno, kontribuis nemalmultan parton; la gajeco fariĝis freneza, kiam kapitano B, la sola persono sen scio de la kaŭzo, iris de unu al alia, demandante, pro kio estas la ridegado, dum ĉies okuloj estis direktataj al liaj tibikarnoj.

—El “Memoraĵoj de Barono de Marbot,” tradukis George Gordon, F.B.E.A.

RECENZOJ.

Eŭropo ĉe la Abismo, de Francesco Nitti, tradukita de Robert Kreutz. (Legu en la julia “Suda Kruc,” paĝo 4.)

Ĉi tiu estas libro, kiu, kia ajn estis la motivo de la aŭtoro, ŝajne estis tradukita en Esperanton kaj dissendita tra la mondo kun unu sola celo. La senpartia serĉanto por la vero kaj la lumo devus legi ĝin apud “La Sendanĝereco de Francujo,” de Andre Honorat.

La tradukinto bone faris sian taskon kaj la malfacila temo fariĝas facila Esperanta legaĵo. La libro montras signojn de rapida preparo, ĉar presfuŝaĵoj abundas, sed oni ne devas esti tro postulema en tiu rilato ĝis nia lingvo estas pli disvastigita inter la preslaboristoj. (C.W.B.)

Oficialo Jarlibro de la Esperanto-Movado, 1924, 12a jaro. Universal Esperanto-Asocio, 12 Boulevard du Theatre, Genevo.

Ĉi tiu jaro la libro havas la amplekson da 303 paĝojn, kaj entenas diversajn novajn informojn. Dividita en tri sekciojn, laŭ sekvanta ordo, estas la partoj—Enciklopedio, Esperantismo, Universal Esperanto-Asocio.

En la parto Enciklopedia en 1923 estis 18 rubrikoj, en la nuna jaro estas 30. Ĉefaj inter la novaj, estas informo pri la Lingvoj en la Mondo, la Nacia Himnaro, la Mono kaj ĝia divido kaj tabelo de afranko kun mencio de aerpoŝtaj servoj. Tre gravaj aldonoj al la parto Esperantista estas la Regularo de la Lingva Komitato, kaj listo de Naciaj Societoj. La parto dediĉata al U.E.A. donas liston de 1200 lokoj nun reprezentantaj per delegitoj, kun mallonga, sed trafa, informo pri la urboj kune kun la nomoj de grupoj kaj detaloj pri la lokoj de la kunvenejoj komencaj horoj, ktp.

Kiel aldono, sur grandformato folio, troviĝas sinoptika tabelo de la mondliteraturo, kiu montras la ĉefajn aŭtorojn de la kulturaj landoj de antikvaj tempoj ĝis la nuna. La tabelo ebligas, kompari per unu rigardo tra la horizontalaj linioj, kio en la sama epoko la diversaj nacioj kreis sur la literatura kampa. La verkoj kiuj estas tradukitaj Esperanten estas indikitaj.

Se ĉiu Esperantisto nur komprenu la intereson kaj valoron de ĉi tiu libro se nur por posedi ĝin, estus grandamasa aliĝo al U.E.A. (C.W.B.)

AN AUSTRALIAN ABROAD.

Mrs. A. Scammell, vice president of the Sydney Esperanto Society, has sent that society a letter relating her experiences at the recent British Esperanto Congress at Chester, of which a few extracts are given below:—

"One of our trips was to the beautiful Llangollen Valley, and two meals were provided for us in the open air; the vegetarians being supplied with special foods at different tables. After the last meal some speeches were made and I conveyed to those present the good wishes of the Australian *gesamideanoj*

It was very interesting to meet so many noteworthy people, about whom I had only read, e.g., S-roj. Merchant, Butler, Edmonds, Harvey, etc. Of course, I hope to meet many of these people again at the International Congress at Vienna, as well as many very eminent Continental Esperantists.

I must also tell you that when the R.M.S. "Orsovo" left Fremantle, a sports' committee was formed and I then asked the president if he would allow me to give a short lecture on Esperanto. He gladly consented and in due time a notice was put up fixing April 25th (Anzac Day) as the date. The weather was fearfully hot and I thought if a dozen people came to the lecture I would be satisfied. Judge my surprise, therefore, to find, on entering the Music Saloon, that it was crowded to the doors, in fact, many people could not get in and I was asked to repeat it I invited those present to join an Esperanto class which I intended to form and offered them small text books, 12 of which had been given to me for propaganda purposes. Consequently there were very many crestfallen faces when I said I had no more. Anyhow, the result was that next morning 30 students joined and we had daily classes."

BRITISH ASSOCIATION FOR THE
ADVANCEMENT OF SCIENCE
REPORTS FAVOURABLY TO
ESPERANTO.

Some years ago the British Association appointed a committee to inquire into the practicability of an international auxiliary language. Among the members were the following well known educationalists, Dr. H. Forster Morley, Dr. E. H. Tripp, Prof. J. J. Findlay, Dr. C. W. Kimmins, Sir Richard Gregory, Sir E. Cooper Perry and Messrs. E. Bulrough, W. B. Hardy, Nowell Smith and A. E. Twentyman. In 1921 the committee provisionally reported that an artificial auxiliary language was desirable. That Esperanto and Ido were suitable languages, but that the committee was not prepared to decide in favour of one or the other. Since then the committee has further considered the matter and has issued a later report. Summarised, it is as follows:—The committee reports that from a philological standpoint it is not able to make a decision. It holds that the final verdict must be made by an international, expert and authoritative body, which should have had general confidence and have studied the question from every possible viewpoint. The committee, however, recognises that from the practical point of view a decision is necessary and has therefore decided to recommend Esperanto, because Esperanto is much more widely practised than Ido is and because experience shows that Esperanto, even if it is not perfect, is quite satisfactory for every ordinary call on it. The committee does not discountenance further experiments, but feels that to recommend two or more languages is to recommend none. It is sufficiently difficult to induce the ordinary citizen to interest himself in one form of international language; to ask him to learn two would be simply foolish.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

LETERO AL AMIKO EN EU'ROPO.

Estimata sinjoro,

En tiu ĉi leteron mi denove penos interesi vin pri la kanguruo.

Batalemaj virkanguruj estas nur unu el cent, kaj liaj kruroj ne sufiĉe bone servis lin, kiam li volas uzi ilin por sin defendi. S-ro Macdonald priskribas batalon, kiun li vidis.

—Dum la vintro post pluvadoj, kiam la rivero en kelkaj lokoj etendiĝis super la ebena tero, mi vidis tiun kuraĝan, kaj bataleman virkangurumon. Li staris kun la dorso kontraŭ granda arbo, kaj la hundoj ne volis ataki tiun belan sesfutojn altajn beston, kaj dum unu el ni staris antaŭ li, kaj minacis lin per bastono, sed tiro revenigos lin ree al la sama loko, kaj ĉiam subita tordo al la flanko, sternigos lin sur la tero, kiam tuj atakas la hundoj, kaj evitante la batojn de la fortaj kruroj, malrapide sed ĉiam mortigas la ĉasadon.

—Tiu ĉi virkanguruo sin defendis per siaj malgrandaj nervaj brakoj, tiel lerte, kiel boksisto, kaj fine saltante facile super la hundoj, ekuregis al la rivero, kiam li ensaltis en la akvon, la hundoj estis ĉe liaj flankoj, kaj denove li sin turnis kaj metis la dorson kontraŭ granda arbo; dum li povis sidi sur la tero, kun liaj brakoj super la akvo, la hundoj devis naĝi, kaj nun li povis fari sian volon kun ili, kaj nun liaj okuloj, kiuj kutime estas tiel serenaj, montris ke li estis kolera, kaj pli kolera, ol tima. Kiam la hundoj proksimiĝis, li antaŭen klinis, kaj puŝis ilin kolere sub la akvon. Li ne tro rapidis, li ne faris eraron. Ĉiu hundo, kiam ĝi atingis la surfacon de la akvo, li denove malsupren puŝis, nun unu tiam la alia, kun trankvila nepartieco, unu hundo ne tiel kuraĝa,

kiel la alia laciĝis, sed la alia daŭrigis la batalon. Sed kiam minacis lin nur unu hundo li baldaŭ finis la batalon. Tenante la hundon en siaj brakoj, li nun tenis lin sub la akvo. La posedanto de la hundo devis helpi aŭ estus droniĝinta la hundo.

—Kurante ĝis la zono en la akvon, li celis per bastono al la kapo, nun la kanguruo ne povis uzi siaj brakojn por eviti la frapegon, sed la celo estis kelkaj koloroj malrekta, se la bato atingis la supron de la kapo, la kanguruo estus tuj mortigita, sed li ricevis la frapon iom super la nazo, la osto frakasigis kaj la sango sprucis sur la flava akvo de la rivero.

—Spasma saltego, unu lasta bato al la hundo, kaj la kanguruo, kaj la hundo kune subakvigis. Ili venis al la supro disigitaj en la fluo de la rivero sed nun nek unu nek la alia volis plu batali. Por preskaŭ kvarono da mejlo la forta fluo portis ilin, tiam ili estis ĉirkaŭ svingitaj en kirlo, inter la akvoherbon, kaj surteriĝis, kaj tie ili kuŝis, tre proksime unu al la alia, ambaŭ grave vunditaj, kaj ambaŭ tie kie ni ne povis helpi aŭ melhelpi. La sekvantan tagon la hundo revenis hejmen, kun granda vundo pe la flanko, kaj la kanguruo jam foriris. Je tiu lasta ekpuŝo la kanguruo frapis sian malamikon iom malantaŭ la ripoj, kaj la longaj tranĉilsimilaj ungoj tranĉis, kiel ŝtalon tra la karno, la vundo estis kune stebita, kaj post kelkaj semajnoj la hundo, kies flankoj portis multajn cikatrojn denove estis batalema, kaj denove ricevante pluajn vundojn.

Pro la historieto la letero estas sufiĉe longa, mi priskribos aliajn Australiajn bestojn en la venonta letero.

Via fidele, P. H.

S-ro M. J. Ravelick, G.P.O., Auckland, New Zealand, deziras korespondi per letero aŭ poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

THE - CHOCOLATE - BOWL

18 Centreway

Collins Street, Melbourne

'Phone 2210

Best quality Chocolates, Nougats, Fudges, Marshmallows, Candies,
4, 5 and 6 oz., 1/-.

Fancy Boxes, 10/- upwards.

Aĉetu de Samideano!

GAZETOJ RICEVITAJ.

Arbeid-Esperantisten, n-ro 1; British Esperantist, n-ro 231; Bulgara Esperantisto, n-ro 10, Brazil Esperantisto, n-ro 1-4; Esperanto Triumfonta, 196 ĝis 201; Export Esperantist n-ro 5; France Esperanto, n-ro 29; Fluganta Skribilo, n-ro 30; Farmacio kaj Hemio, n-ro 1; Internacia Stenografisto, n-ro 8; Internacia Komercisto, n-ro 13; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, n-ro 63; International Language, n-ro 6, 7; Internaciaj Informoj, n-ro la; La Espero, n-ro 6-7; La Unuigita Tuthomaro, maj-junio, julio; La Suno Hispana, n-ro 85; La Interligilo de L.P.T.T., n-ro 8; Litova Stelo, n-ro 7; La Revuo Orienta, n-ro 7; Novaj Tempoj, n-o 5-6; Pola Esperantisto, n-o 5; Radio Rundschau, n-o 11; Revuo, n-o 6, 7; Sennacieca Revuo, n-o 9, 10, (Sennacieca Revuo plendas, ke ni, en n-o. 46, priskribis ĝin kiel "komunistan.") Ĝia redaktoro nun donas la oficialan informon, ke "Sennacieca Revuo" estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu konsistas el socialistoj, anarkistoj kaj komunistoj." Ŝajne nia kulpo estis, ke ni ne diris, ke krom Komunistoj, la subtenantoj de la ĵurnalo estas "socialistoj, sindkiatistoj kaj anarkistoj." Red.) Volker Spiegel, n-o 9 ĝis 12.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 31 aŭgusto ni ricevis la jenajn sumojn:—Halls Book Store, 17/6; P. Hudson, 4/6, julio '25; C. M. Pocklington, 4/6, julio '25; Rev. J. T. Downey, junio '26; A. S. Cribb, 9/-, junio '24; A. Greiser, 10/-, aŭgusto '26; E. Cox, 4/6, junio '25; L. Irwin, 4/6, '25; F. T. Bury, 10/-, junio '26; M. Helm, 5/-, junio '25; A. R. Cohen, 5/-, junio '25; A. R. Cohen, 15/-, anonco, junio '24; G. Collingridge, 4/6, junio '25; A. E. Church, 5/-, novembro '24; F. T. Hepworth, 4/6, aŭgusto '25; H. Byatt, 9/-, julio '25; A. R. Holmes, 4/6, junio '25; A. Moyle, 4/6, junio '25; G. Mercer, 4/6, majo '24; C. M. Hanaford, 4/6, junio '25; G. Meyer, 5/-, junio '26; Brisbane Esperanto Club, 5/-, julio '25; M. Holdensen, 4/6, aprilo '25; M. Nicholls, 20/-, januaro '26; kontantaj, 2/2.

KONGRESAJ AFEROJ.

La jenaj sumoj estas ricevitaj de la kasisto dum la pasinta monato. Kongresaj pagoj:—n-o 20, M. H. Clarke, 4/-; n-o 21, f-ino Pyke, 21/-; n-o 22, s-ino Stanton, 21/-; n-o 23, f-ino Williams, 5/-; n-o 24, s-ro Hussey, 21/6; n-o 25, G. Collingridge, 10/6; n-o 26, s-ino Henry, 21/-; n-o 27, s-ino Dauber, 21/-; n-o 28, s-ino Buck, 3/-; n-o 29, s-ro Phillips, 2/-; D-r F. Williams, 21/-.. Donacoj:—f-ino Ternan "Recital" £4/19/6; s-ro Dadwell, 5/-; Walking Club, 14/-.

La organizantoj dankas tiujn, kiuj tiel rapide respondis la alvokon por havigi la necesan kongresan kapitalon. Oni petas ĉiujn gesamideanojn sendu la kongresajn pagojn, kiel eble plej baldaŭ. Donacoj ankaŭ estas ricevotaj de la kasisto. Se estas oportune por samideanoj pagi iom po monate, bonvolu fari tion. Ni laboru fari la venontan kongreson la plej grava propagandilo. Ni varbu novajn kongresanojn, aŭ Esperantistoj aŭ ne esperantistoj. Jam tridek anoj aliĝis. Ni ĉiu faru nian eblon por varbi almenaŭ du cent. Iru antaŭen.

NIAJ LERNANTOJ.

Al la redaktoro:—Kun plezuro mi legis la opinion de "Ho Bo" pri la superskribita. Mi kore konsentas ke tio, kion oni akiras senpage oni ne valoras. Samtempe, se oni postulus pagon de la lernantoj, ofte, mi opinias, ke tio forpelus komencantojn, speciale la infanojn.

Je nia grupo ni havas kelkajn junulojn, kiuj aliĝis la klubon kaj pagas la jaran kotizon, same kiel la plispartulojn. Por tio ili ricevas specialan instruon dum eble duonhoron ĉiu dusemajne (laŭ la tempo disponebla antaŭ la kutima rutino komencas) kaj ofte pluan helpon aŭ praktiko kun la aliaj anoj, laŭ oportune. Tamen, tio sendube ne estas tute kion via korespondanto havas en menso. Se oni starigas regulan instruad-kurson (kiu, kompreneble, postulus ke iu dediĉos unu aŭ du vesperojn ĉiusemajne por la instruado), tiam mi opinias ke certe la partoprenantoj devus pagi ion por la profito ili gajnas, sed eble plimalgranda sumo sufiĉas; diru duongineo. Esperante legi aliajn opiniojn. D. Gilbert (Del. U.E.A. Hobart).

KRONIKO.

Sidnejo, N.S.K.—La programo de Sydney'a Esperanto Societo dum la pasinta monato estis jene:—

7a. Aŭgusto—Kinematografata prezentado kun esperanta klarigado de S-ro L. E. Thomson. Filmoj konsistis el scenaĵoj el diversaj mondpartoj, malpli konataj industrioj, modernaj teknikaj mirindaĵoj kaj humoraj temoj.

14a. Aŭgusto—Parolado de S-ro F. T. Simon pri "Revuo de Internacia Lingva Movado," pritraktante francan, anglan kaj latinan lingvojn unuflanke kaj Volapük, Esperanto kaj Ido aliflanke, laŭ libro de Profesoro A. L. Guerard.

21a. Aŭgusto—Teatraĵeto, "La Mimiko," ludita de S-roj V. Rutland (kiel la mimikisto), W. Hamann (bienhavanto), D. Healy (veturigisto), H. Torr kaj G. Winter (amiko de l' bienhavanto). Tiu komedio estis sekvitata de seriozaj kantoj en maoria lingvo de du plensangaj Nov-Zelandanoj, kaj D-ro F. J. Williams parolis interese pri sia 12 monata restado en Nov-Kaledonio de kie ili ĵus revenis. Kiel finaĵo de tre ĝuinda vespero, burlesko verkita de Sydney'a ano, S-ro G. Winter, titolita "La Francano," estis ludita de F-ino V. Fairceld, S-ro B. Daines, H. Torr kaj la aŭtoro.

28a Aŭgusto—Serĉa interdiskutado pri elektitaj temoj.

Ĉi-tieaj tagĵurnaloj elstare publikigis kablon el Genevo en kiu estis dirita, ke Ligo de Nacioj gratulis la aŭtoron de "rivala lingvo" Parlamenton, pro ĝia supereco al Esperanto. Ĉefartikoloj mokante nian lingvon tuj aperis en kelkaj ĵurnaloj kaj vigla korespondado por kaj kontraŭ Esperanton rezultiĝis kaj daŭrigas. Sed ni ne estos venkotaj!

Ĵurnaloj enpresinte artikolojn pri Esperanto dum Aŭgusto estis:—Daily Guardian, Daily Telegraph, Evening News, Sydney Morning Herald, The Sun kaj Wireless Weekly.

Hobarto, Tasmanujo.—La jara kunveno de la Hobarta Esperanta Grupo okazis je la 31 junio 1924, ĉe la Eaton-Bray-lernejo. La raporto montris, ke la kutimaj kunvenoj okazis, kaj ke la anaro iom pligrandiĝis, kaj la bilanco montris malgrandan kreditan havon. F-ino C. Hannaford estas elektita, kiel prezidantino, kaj f-ino C. Beckett, kiel sekretariino.

HERE AND THERE.

The British Esperanto Association announces that an index to Millidge's Dictionary is in preparation. Presumably this is an index of the English equivalents of the words in the dictionary similar to that prepared several years ago by s-ro George Gordon, but up till now unpublished. Australian Esperantists, and doubtless Esperantists the whole world over, are impatiently awaiting the announcement that the Zamenhof translation of the Bible will soon be available.

The King's speech at the opening of the Exhibition at Wembley which was broadcasted in Esperanto, was heard in fourteen countries—from Tunis to Finland. Mr. Epton is reported to have an ideal voice for wireless telephony.

9000 miles! An Esperanto speech on 6th April from Newark, U.S.A., was plainly heard in Tokyo without relay. This is, we believe, a record for long-distance broadcasting, and demonstrates the clarity of Esperanto.

Some Progressive Schools.—At Bari, in Italy, Esperanto has recently been introduced into the following schools:—Royal Commercial Institute, Royal Nautical Institute, Royal Technical Institute, the National College, the Archbishop's Seminary and the Nasuti College. Two classes are also being conducted at the Academy.

GERMAN GOVERNMENT FAVOURABLE TO ESPERANTO.

The German Government has shown in many ways that it perceives the value of Esperanto. The President was the Patron of the recent Esperanto Congress, held at Nuremberg, and was personally represented thereat by the Secretary of State. The Minister of Internal Affairs has now issued a circular to the Education Department of each federal state, in which he exhorts them to facilitate the instruction of Esperanto in every manner possible and expresses the hope that throughout Germany there will be an increasing desire evinced by the Educational authorities to co-operate in the teaching of Esperanto.

NATURE'S LITTLE JOKE.

Nature plays some strange tricks at times. Some years back, a selector on the north coast of Queensland, having no permanent water, decided to put down a large dam. After a good deal of labor and no little expense, the work, which was executed in a drought period, was at last satisfactorily completed. But rain continued to hang off, and, as water for stock was urgently required, the selector decided to sink a well nearby and fill the dam with water he hoped to strike. Just before dinner one day, and when the well had been carried down only about 12 feet, the signs of water at a shallow depth were so encouraging that one of the workers seized an ordinary auger, which had been required in erecting the windlass, and bored into the soft, moist floor of the well. When the boring tool was withdrawn, after being worked down some depth, water clear as crystal shot up from the auger-hole as from a miniature geyser. In an exuberance of spirits the toilers shook hand and trotted home for dinner, leaving their tools in the well. Returning to work about an hour later, they could scarcely believe their eyes at beholding the well almost overflowing its brim. The tools were fished out and home again the workers went rejoicing. All that remained now was to erect the windmill and fill the dam. But next day it rained, six inches falling in a couple of hours. When the selector and his man went down to see how things were they had to dive down two feet to get to the top of the well. The dam was full and overflowing its banks. Sounds like a fairy tale, but it's solid fact.—From the *Worlds News*.

LA NATURO S'ERCAS.

Foje, la naturo strange ludas. Antaŭ kelkaj jaroj, pioniro kiu loĝas ĉe la norda marbordo de Kvinlando, sur kies bieno, mankis ĉiama akvo-provizo decidis konstrui grandan digon. Post multe da laboro, kaj multe da elspezo, la laboro kiu estis farita dum longa pluvmanka tempo, estis fine kontentige finita. Sed ankoraŭ oni atendis la pluvon, kaj ĉar la akvo estis urĝe bezonata por la brutaro, la pioniro decidis, proksime al la digo elfosi puton, kaj plenigi la digon per la akvo, kion li esperis trovi.

Unu tagon ĵus antaŭ ol la meztagmanĝo, kaj kiam la puto estis nur dekdu futojn profunda, signoj, ke akvo troviĝos proksime estis tiel kuraĝigaj, ke unu el la laborantoj prenis borilon, kiun oni uzis dum la konstruo de la vindlaso, kaj boris en le molan, malseketan fundon de la puto. Kiam la borilo estis elprenita, post kiam oni jam iom traboris, akvo klara kiel kristalo ŝprucis el la traboro, kiel el eta geĵero. Kun ĝojego la laborantoj riciproke manprenis unu la alian, kaj iris hejmen por tagmanĝi, lasinte la ilojn en la puto. Reveninte post unu horo, ili preskaŭ ne povis kredi tion, kion ili vidis, la puto estis preskaŭ akvoplena. La ilojn ili regajnis, kaj hejmen denove iris la ĝojplenaj laborantoj.

Nun estis nur necese starigi la ventmuelilon, kaj per akvo plenigi la digon. Sed la proksiman tagon, pluvegis, ses coloj da pluvo falis dum du horoj. Kiam la pioniro, kaj liaj laborantoj, iris por observi, kiel progresas la afero, ili trovis, ke la supro de la puto jam estis du futoj sub la nivelo de la akvo. La digo estis akvoplena, kaj la akvo jam superfluis la bordojn.

Oni povas pensi, ke tiu ĉi estas ferakonto, sed estas vere fakto.

Tradukis, P. H.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET, KEW.

KVAR ARABIAJ PROVERBOJ.

Kiu ne scias, kaj ne scias ke li ne scias, tiu estas stulta. Evidu lin.

Kiu ne scias, kaj scias ke li ne scias, tiu estas bona. Instruu lin.

Kiu scias, kaj ne scias ke li scias, tiu estas dormanta. Veku lin.

Kiu scias, kaj scias ke li scias, tiu estas saĝa. Imitu lin.

Tradukis, M. P.

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A.E.A.
(Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wellington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburno Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. L. Clarke; sekretario, s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejoj: Hardware Chambers, 350 Little Collins-str.; vendrede vespere, je la oka horo.

A.N.A.- Grupo, Oakleigh. Prezidanto: sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sinjoro D. Thomson, poŝta adreso: ĉe British Imperial Oil Co., 153 William-str., Melbourne. Kunvenejoj: Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde vespere je la oka horo.

Brisbane Esperanto Club. Sekretario S-ro A. J. Sycamore, C/- Mr. W. Hartley, Carlton St., Highgate Hill, Sth. Brisbane. Address enquiries to Secretary, who may be seen between 12 noon and 1 p.m. at Murray Fraser Ltd., Charlotte St., City.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejoj kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd. Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo. Prezidanto, S-ro Alfred Gregory, Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejoj: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigah Rd., Oakleigh. Kunvenejoj: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo. "Perth Academy," komencantoj merkrede; progresintoj, 9 Pier-str. Ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejoj kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejoj: La domo de S-ro Tilly, strato Water Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Raciista Esperanta kaj Diskutgrupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie; sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str. North Carlton, Melbourne. Kunvenejoj, Temperance Hall, Russell-str. Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hebarta Esperanta Grupo. Kunvenejoj: Eaton-Bray-lernejo, Davey str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino J. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.